§ Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Marto: 2 2023


## PATRO AKUZITA PRI KONTRAŬ-ŜTATAJ AGADOJ PRO BILDO DESEGNITA DE SIA FILINO

Maŝa, 12-jaraĝa knabino loĝanta en la rusa urbo Efremov, desegnis bildon en la lernejo. Sur ĝi aperis ukraina kaj rusa flagoj kun la frazo "Ne al la milito". Inter ambaŭ flagoj aperas virino kun infano sub bomboj. La instruistino tuj sciigis pri ĉi tiu desegnaĵo al la direktoro de la lernejo, kiu, siafoje, elpelis ŝin el la lernejo kaj avertis la policon.

Policano kontaktis kun la patro de la knabino, oni ekigis administracian proceson kontraŭ la patro, sub la akuzo realigi publikajn agadojn por misfamigi la armeon de la Rusa Federacio. Alexei Moskalev, patro de Maŝa, argumentis, ke lia filino estas kontraŭ la milito kaj la sang-elverŝo, do, temas pri nobla idearo laŭ lia opinio.

Alexei Moskalev, jam en la monato 2022, estis kondamnita pagi 32.000 rublojn por la publikigo ene de sociaj retejoj de kontraŭ-milita komento.

Okaze de ĉi tiu nova jura proceso kontraŭ li, pro la desegnaĵo farita de lia filino, la kazo povus finiĝi per kondamno de tri-jara malliberigo.




Nuntempe, la patro estas enhejme arestita ĝis la fino de la kuranta monato marto kaj la knabino, dum la unuaj tagoj de la proceso, estas enirigita en korektan domon por minor-aĝuloj.

Ĝis nun la rusaj leĝoj malpermesis esprimi opiniojn malfavore al la rusa agres-milito kontraŭ Ukrainio, sed nuntempe videblas ke tiu malpermeso ankaŭ rilatas al opinioj aŭ komentoj faritaj de infanoj, kies gepatroj povas esti akuzitaj havigi al filoj instruojn kontraŭ la ŝtato kaj ties armeo.


# Vorto de la Semajno

## DAKTILOSKOPIO:

Procedo, per kiu oni identigas personojn per la observado de la haŭtlinioj sur la polma flanko de la fingropintoj.

*Sinonimoj: Premsignoj, spuroj.*

*La unua de septembro okazas la internacia tago de la daktiloskopio.*



## ĈU VI DEZIRAS KUNLABORI EN ELDONA PROJEKTO DE NIA ASOCIO POR LA KURANTA JARO 2023?

Internacia Jurista Esperanto-Asocio celas verki libron dum la kuranta jaro 2023. Ĝi enhavos eseojn pri juraj temoj redaktitaj en la internacia lingvo, do la ĉeftemo ne estas Esperanto, nia lingvo utilos nur por diskonigi jurajn temojn.

Se vi estas preta kunlabori bv. kontakti kun la jurista asocio. Tiam ni informos al vi pri eblaj temoj, nombro da paĝoj kaj aliaj aferoj.

Do, se vi estas preta verki pri juraj temoj en nia internacia lingvo, jen via ŝanco.

Kontaktu kun jurista@esperanto.ac